

SCIENCA REVUO

UDK 000/05/=089.2

Vol.23, n-ro 1-2/93-94

25.4.1972.

Aperas sesfoje jare. Jarabono 55 steloj aŭ 4,50 us.dol. aŭ 75 din.

El la enhavo:

Kavka-Pumpr: Poŝatlaso de la mondo
 H.D.Maas: Pri strategio de aŭtomata lingvo-tradukado
 S.K.Hvorostin: Cara cenzuro kaj Esperanto /unua parto/
 J.Dagys: Pri fiziologio de plantoj kaj agrarkulturo
 Ryjov-Gončarov: Studo de neakvaj sistemoj per.... metodoj
 Sučkov-Matvijiŝin: La duonmarka direktita procezo kaj.....
 A.Bednařík: Historio de projektoj.....Danubo, Elbo kaj Odro

POŜATLASO DE LA MONDO
 KONTRIBUO AL GEOGRAFIA NOMENKLATURO EN ESPERANTO
 (J. Kavka - T. Pumpr, PRAGO, Ĉeĥoslovakio)

1. ENKONDUKO

En la antaŭparolo de POŜATLASO DE LA MONDO, kiun ĵus aperigis la praga eldonejo *Kartografie*, estas promesite, ke ni, la tradukintoj, per aparta artikolo en la SCIENCA REVUO, organo de ISAE, eksplikos la principojn kiujn ni sekvis ĉe nia traduklaboro, kaj elnombros la fontojn, kiujn ni konsultis. Tion ni volas nun plenumi.

1.1 Akompana letero de la eldonejo

La eldoneja redakcio, kiu respondecas pri la enhavo de la poŝatlaso, ties amplekso, aranĝo kaj teknika pretigo kaj kiu fiksis la gvidliniojn por la elekto de la tradukendaj terminoj, petis ke oni metu en la traktaton ankaŭ ĝian ne-grandan akompanan leteron. Jen ĝi sekvas:

"Nia geografia verko, eldonata en formo de poŝatlaso, kun multaj taŭge elektitaj mapoj de la tuta mondo kaj kun abundaj informoj politikaj, administraj kaj ekonomiaj, akiris renomon ĉe la publiko. En Ĉeĥoslovakio mem ĝi estas aperinta ĉeĥlingve jam la sepan fojon; krome ĝi estas eldonita en pliaj 11 versioj alilingvaj (inter ili angle - aparte por Britio kaj por Usono - , france, hispane, japane...). La eldonisto, rekonante la utilecon de la lingvo internacia, decidigis aperigi la libron ankaŭ en Esperanto. Li konsciis, ke realigo de tiu intenco ne estas afero facila, ĉar la geografiaj nomoj en tia amplekso ankoraŭ ne estis unuece fiksitaj kaj publikigitaj. La entrepreno estis ebligita per tiu fakto, ke troviĝis taŭgaj kunlaborantoj, lingve kaj science eruditaj. La laboro de la tradukantoj estis helpita per senmezura komplezo de la redaktejaj recenzistoj kaj de multaj

ekspertoj diverslandaj (lektoroj por apartaj libro-partoj aŭ informantoj pri specialaj demandoj, pri kiuj ili estis individue konsultitaj). Tiu ĉi kolektiva kunaĝado pliprecizigis la nomenklaturon kaj kontribuis al la nivelo de la verko, kiu certe estas utila voĉo en la ankoraŭa diskutado, eĉ se oni konscias, ke ĝi ne reprezentas la finan stadion kaj la unikan kaj definitivan solvon de la geografia terminaro en Esperanto.

La eldonisto strebos siatempe reeldoni la poŝatlason en Esperanto kaj ĉe tio ekspluati la amendojn de ties uzantoj ajne ĉu el la vico de individuaj esperantistoj, ajne ĉu el la vico de organizaĵoj kaj institucioj, kiuj certe esprimos sian starpunkton kaj subtenos la ideon de pliperfektigo de la libro. Tio koncernas unuavice la geografiajn terminojn, kiujn oni en la dua eldono povos konformigi al la rezultoj de atendata diskuto kaj esence plinombrigi.

La amendoj kaj rimarkigoj koncerne la poŝatlason estas sendotaj:

a/ se temos pri la enhavo de la libro kaj pri ties informoj en la teksto aŭ pri la enhavo de la mapoj, al la adreso:

"Kartografie, n.p., Křižíkova 1, PRAHA, Ĉeĥoslovakio";

b/ se temos nur pri la traduko de la mapoj, pri la registro kaj pri la Esperantaj loknomoj entute, al la adreso:

"D-ro J. Kavka, CSc., Lužná 7, PRAHA 6-Vokovice, Ĉeĥosl.";

c/ se temos nur pri la traduko de la tekstoj kaj pri la lingva flanko entute, al la adreso:

"D-ro T. Pumpr, Thälmannova 8, PRAHA 6-Bubeneč, Ĉeĥosl.-io".

En Prago, 1. aŭg. 1971.

Redakcio de la eldonejo *Kartografie*."

Al tiu letero de la eldonisto ni volus emfazi, ke *Kartografie* estas komerca organizaĵo, staranta ekster la Esperanto-movado. Tamen ĝi mem iniciatis la eldonon de la poŝatlaso en la internacia lingvo kaj plene portas la grandajn elspezojn, kiuj estas neeviteble multe pli altaj ĉe libro tiel ampleksa kaj teknike multpretenda, ol estas la produktataj kostoj de libroj beletraj. Kia ajn estos la starpunkto de la legantoj pri tiu aŭ alia demando, solvata en la libro, oni tamen devus rekoni, ke la esperantistoj ricevis en la manojn verkon seriozan kaj en sia speco senprecedencan. Pro tio la eldonejo *Kartografie* estas dankinda.

1.2. Organizado de la laboro

La taskoj estis dividitaj inter la du tradukantoj jene:

J. Kavka havis la respondecon pri la mapoj, pri la registro kaj pri la traduko de la loknomoj, kunlabore kun diverslandaj fakuloj; al T. Pumpr oni komisiis la tradukon de la teksto kaj ĝeneralan zorgon pri la lingva flanko; krome li konsulte kunlaboris ankaŭ pri solvado de demandoj nomenklaturaj.

La eldonisto akceptis ankaŭ du lektorojn, ambaŭ el Pra-
go, kiuj recenzis por lia redakcio la tradukaĵojn: d-ron V.
Zázvorka, CSc., kaj s-ron *J. Mařík*.

Per personaj leteroj estis alvokitaj al kunlaborado di-
verslandaj fakuloj kaj institucioj, kiuj jam aktivis en la
geografiaj aferoj, aŭ interesiĝis pri ili. Iliajn nomojn le-
gu en la antaŭparolo de la poŝatlaso.*

La unua paŝo de nia laboro estis, kolekti literaturon
kun geografiaj temoj en Esperanto kaj eltiri trovitajn lok-
nomojn, komparante la starpunktojn kaj tradukmetodojn de la
unuopaj aŭtoroj. Ĉiu geografiaĵo (lando, urbo, monto, maro,
lago, rivero...) ricevis sian slipon, sur kiun estis trans-
portataj ĉiuj tradukformoj, renkontitaj en la publikaĵoj, kun
indiko pri la aŭtoro kaj ev. lia motivigo. Per tiu kolosa
laboro, kiun plenumis *J. Kavka*, estiĝis unika kartoteko en-
havanta pli ol 7000 slipojn (aŭ eĉ dikajn kovertojn por el-
tiraĵoj, proponoj kaj argumentoj), kun po unu kapvorto kaj ti-
es varioj.

Tiu ĉi kartoteko servis por konstati, ĉu dum la jaroj
stabiliĝis Esperanta formo de iu loknomo, aŭ ĉu la lingvou-
zo ankoraŭ ŝanceliĝas inter malsamaj solvoj. Ekz., nepre jam
stabila estas la nomo Varsovio, kvankam al la nunaj metodoj
de la nomformado respondus pli la formo Varŝavo; kaj aliflan-
ke: la Esperanta formo por *Buenos Aires* ne estas unueca:
jen Bonaero (M), jen Buenos-Ajreso (PIV). Nia strebo do es-
tis, elspuri la tendencojn, kiuj regas en la lingvopraktiko,
kaj trovi kiuj inter ili superas. Tion oni ne povas konsta-
ti per simpla matematika kalkulado, kiomfoje tiu aŭ alia for-
mo aperas ĉe unu kaj la sama geografia nocio, sed estas ne-
cese trarigardi la tutan terenon de la nocioj samspecaj kaj
samdevenaj, por ricevi plejeble homogenan kaj koheran siste-
mon nomenklaturan. Ne ĉiam estas tio ebla kaj ĉiuj, kiuj la-
boris en tiu ĉi agendo, certe konsentos ke la geografia ter-
minaro en Esperanto ankoraŭ longe havos siajn specifajn pro-
blemojn, pri kiuj oni diskutados.

Niaj kunlaborantoj ricevadis provizorajn tradukojnde la
poŝatlaso, aŭ de ties respektiva parto, ordigitajn laŭ la ma-
poj, kaj ili, trastudinte tiujn materialojn, komunikadis al
ni siajn kritikojn kaj amendojn. La rezulto de tiu korespon-
dado, eĉ kun la motovigo de la aŭtoroj, ankaŭ estis transpor-
tata sur la slipojn de la kartoteko kaj fariĝis bazo por nia
elekto de la definitiva formo, uzota en la poŝatlaso. Ni mal-
kaŝu, ke tiu interŝanĝado de la opinioj estis plurfoje tre
vigla kaj pri iuj principaj demandoj oni plenskribis multe da
papero. Kaj sekve ankaŭ estas dirende, ke por la elektita fo-
rmo respondecas nur la tradukintoj de la poŝatlaso, neniel
iliaj kunlaborintoj.

*/ Krome ankaŭ d-ro *M. Duplan*, Alĝero, disponigis al ni
ampleksan kaj gravan materialon pri la araba mondo (politika
kaj administra divido, valutoj), bedaŭrinde, lia sendaĵo ati-
ngis nin jam post la imprimaturo kaj sekve ne plu estas res-
pektita en la libro. Tamen la redakcio ekspluatis ĝin alima-
niere. Ankaŭ al d-ro Duplan apartenas la danko.

1.3 Mondmapo kaj Plena Ilustrita Vortaro

La eldono de la MONDMAPO (1968.) signifis gravan provon grandskale sistemigi la Esperantan geografian nomenklaturon. La PLENA ILUSTRITA VORTARO (1970.) diverĝas de kelkaj el ĝiaj principoj. Estas bedaŭrinde, ke ni havis la tekston de PIV nur en la lasta stadio de la traduklaboro, kaj eĉ pli, ke ne koincidis la preparo de PIV kaj de la poŝatlaso. Tiam estus eble eĉ pli konformigi reciproke la elektitajn solvojn. Tamen eĉ tiel ŝajnas al ni, kaj tiun opinion partoprenas ankaŭ G. Waringhien, ke en la grandaj linioj la akordeco de ambaŭ verkoj estas sufiĉe granda, por ke nenia malutilo rezultu el ilia aparta redaktiĝo.

2. ELEKTO DE TRADUKENDAJ NOMOJ

Nur iom pli ol triono (proksimume 35%, t.e. 4 200) el la entuta nombro de loknomoj (proksimume 12000) estas esperantigita, ekz. Prago. La ceteraj konservas sian originalan formon, ekz. *Bordeaux*. Eble ĉiu uzanto de PM surpriziĝos, ke iuj etaj lokoj, ekz. Pjatiĥatko, aperas en Esperanta robo, dum aliaj, pli konsiderindaj, ekz. *Glasgow*, restas netuŝitaj. Unuavide li ekhavos impreson, ke la elektado estis absolute neracia. Laŭ kiuj principoj ĝi efektive okazis?

Antaŭ ĉio ni substreku, ke pri l'elekto de nomoj esperantigendaj respondecas sole la eldonejo de PM, neniel ties tradukantoj kaj iliaj kunlaborantoj. La supre nomita eldonejo havas siajn proprajn spertojn pri alilingvaj versioj, sian propran koncepton pri ellaboro kaj redaktado de la poŝatlasoj, sian ekonomian-teknikan vidpunkton.

Kiel bazon por Esperanta traduko, *Kartografie* prenis la version britan, kies maparkompleto postulis ne tro esencan modifon: sufiĉis elimini tri mapojn de Britio kaj ŝanĝi numeradon de l'unuaj naŭ mapoj.

Analoge al nacilingvaj versioj, unue oni ellaboris liston de tradukendaj nomoj. Ne estis dubo, ke bazaj nomoj de la fizika geografio devas aperi en *formo asimilita*, t.e. fleksebla laŭ reguloj de l'Esperanta gramatiko: Atlantika oceano, Bengala golfo, Tanganjika lago k.t.p. Kiom koncernas la mapojn politikajn, kiuj grave dominas en PM, stariĝis evidenta principo: unue, ke la formon asimilitan havu ankaŭ nomoj de la landoj, de ties ĉefurboj kaj de urboj signifoplenaj por la Esperanto-movado, ekz. Usono kaj Vaŝingtono, Cejlono kaj Kolombo, Bjalistoko kaj Bulonjo...; due, ke la ceteraj nomoj kontentiĝu provizore pri *formo neasimilita*.

Tamen, la nomoj kies originaloj ne ekzistas en la latina skribo, postulas en ĉiu nacilingva versio specialan transskribon. En Esperanto, altfidela transskribo laŭprononca kondukus ofte al formoj tre nekutimaj. Tial la redakcio decidis doni ankaŭ al ili la formon asimilitan. Sed kie transskribo el anglalingvaj mapoj ne estis necesa laŭ la vidpunkto de la Esperanta prononco, la nomo restis senŝanĝa (ekz. *Nagasaki*), por ke ne pligrandiĝu kostoj de la mapdesegnado. Nur en venontaj eldonoj oni povos pliampleksigi nombron de la nomoj asimilitaj, precipe en la landoj kie PM pleje disvastiĝos.

3. IOM PRI TRANSLITERIGO KAJ TRANSSKRIBO

La lingvo internacia, simile keil ĉiu lingvo nacia, estas senĉese penetrata de fremdaj nomoj. Ĉiutaga kontakto kun ili kondukas al diversmaniera kunekzistado de la lingvoj "gastiganta" kaj "gastigata". En iu lingvo, fremda gasto konservas sian originalan grafismon, en alia ĝi aperis alirobe, revestita laŭ ortografiaj reguloj de la lingvo gastiganta. Konforme al strukturo kaj reciproka parenceco de la koncernaj lingvoj, fremdaĵo estas fleksata aŭ ne. Post jardekoj, ĝi povas tute perdi sian ekzotikecon. Ankaŭ en Esperanto abundas multaj laknomoj, kies fremdecon oni ne plu perceptas. Temas ĉefe pri tiuj de la fizika geografio: Andoj, Sumatro, Saharo, Mediteranea maro, Gango k.t.p.

Sed kiel trakti malpli konatajn montojn, lagojn, riverojn, urbojn? Multaj aŭtoroj esprimis sian opinion pri la demando, ekz. G. MOCH (1910), M. BUTLER (1947-1949), A. THOMSON (1960), A. LIENHARDT (1969, 1970). Kelkaj el ili defendas principon, ke la fremdaj nomoj restu en sia originala formo. Sed tiu ĉi principo ĉesas funkcii antaŭ nevenkebla obstaklo de la nelatinaj skriboj. Aliaj aŭtoroj pledas por meĥanika transskribio helpe de l' Esperanta alfabeto kaj samtempe kontraŭ pli granda disvastiĝo de la formoj asimilitaj. Precipe D. ARMAND (1962, 1963, 1969, 1970) kolektis multe da valoraj spertoj pri tiuspeca sistemo, elaborinte tabelon por fonetika transskribo de azbuko en Esperanton. (Parenteze: iom alian principon, nome grafikan transliterigon de azbuko, proponis A. ALBAULT en MONDA KULTURO). Oni prave argumentas, ke estus tre malfacile por la lingvo internacia, asimili sennombrajn loknomojn de la tuta mondo; ŝajnas ja pli simple normigi sistemon de transskribado el ĉiu lingvo, Esperanten. Nu la estonteco montros, ĉu tia tasko povos realiĝi. Provizore, normigita transskribo ne estas ta. Nia poŝatlaso apenaŭ estus taŭga okazo, por eksperimenti sur tui ĉi kompo, eĉ se oni ne konsiderus seriozajn voĉojn de la kunlaborintoj, kiuj preskaŭ unuece pledis ne por transskribo, sed por asimila esperantigo de la loknomoj.

Kelkiam oni riproĉas al asimila esperantigado malkonsekvencon, subjektivecon, perfortadon de originalaj nomoj k.t.p. Sed ĉu adeptoj de meĥanika transliterigado aŭ transskribado procedas alimaniere? Ili ja ne kapablas interkonsentiĝi, ĉu *Leipzig*, *Leipcig*, *Lejpcig* aŭ *Lajpcig*; ĉu *Dnepr*, *Dnjepr*, *Dnjeper*, *Dnjeprj* aŭ *Dnjiprj*; ĉu *Salisbury*, *Salisbury*, *Salsburi* aŭ *Solsberi*; ĉu *Calcutta*, *Kalkuta*, *Kalkata* aŭ *Koĵkata*; ĉu *Vilnius* (HSL) aŭ *Vilnjus* (HSL)... La kvin ekzemploj eble sufiĉas por demonstro, ke transskribado devas fronti eĉ al pli multaj obstakloj ol asimilado, kiu baziĝante sur kompromiso inter grafismo kaj prononco (kp. F. MUNIKSMA, 1970), tamen inklinas al formoj pli facile rekoncibleblaj, pli facile prononceblaj, pli belsonaj, pli propraj al Esperanto. Bonvolu kompari hazarde elektitajn ekzemplojn: *Ŭoŝingtn* kaj Vaŝingtono (Z), *Astraĥanj* kaj Astraĥano (PIV), *Dimaŝkaŝ* Ŝam kaj Damasko (LA), *Ĉhung-Ĉĥing* kaj Ĉongkingo (PM). Fleksebleco de l' asimilitaj formoj evitigas stilajn

malpuraĵojn kunportatajn de la nomoj originalformaj aŭ meĥanike transskribitaj: *Praha*-a ŝinko, *Praha* -anoj, biero de *Plzen* aŭ *Plzenj*, *Geneve*-lago, vojaĝi *Edinburgh*' (o)n, *Marseille*' (o)n au *Marsej*' (o)n. Kiom pli eleganta teksto estas tiu, kiu aplikas la formojn flekseblajn: praga ŝinko, pilzenja biero. Geneva lago, vojaĝi Edinburgon, Marsejlon k.t.p.

Se la nomoj estas plurvortaj, la situacio ankoraŭ pli komplikigas; ne eblas uzi adjektivojn kaj sufiksojn *Komso-molsk-na-Amure-a*, *Dar-es-Salam-a*, *Andorra-la-Vella*-ano, sed necesas kontentiĝi pri la tro ofta, maŝinece monotoniga prepozicio: de.

4. GENERALAJ PROBLEMOJ DE ASIMILA ESPERANTIGO

4.1. P r o b l e m o f i n v o k a l a

Kiel ni montris antaŭe, grava transformo de originala nomo nacilingva okazas tre ofte jam per transskribo helpe de l'Esperanta alfabeto. Tamen, aplikado de la substantiva aŭ adjektiva finaĵo, same kiel de sufiksoj (ekz. -an-) povas alporti kroman problemon. Transskribo mem ja ne solvas difinon de Esperanta radiko, se originalo finiĝas per vokalo. Tiam eblas diskuti, ĉu koncerna radiko esperantlingva (ne la fontlingva) eskludas aŭ inkludas la finan vokalon. Do ne mirige, ke oni renkontiĝas kun Gano (B) kaj Ganao (LA), Limo (LA)-Limao (M), Jaundo (M) kaj Jaundeo (A), Najrobo (M) kaj Najrobio (Mu), Katmando (Mi) kaj Katmanduo (M), Tahito (PG 1938) kaj Tahitio (PG 1958), Vagadugo (M) kaj Vagaduguo (Mu). Kiel elekti el tiuj ĉi kaj multaj ceteraj duoblaĵoj? (Kp. D. ARMAND 1963, p.86-87).

PM klare, eĉ laŭeble konsekvence, preferas la plisimplan el la du alternativoj, ĉar forigo de la fina vokalo estas sendube pli propra al la nun ekzistanta vortotrezoro de Esperanto. Ne nur granda plimulto de la loknomoj, sed ankaŭ de aliaj propraj nomoj, estas formita laŭ tia modelo: Afro-dito, ne Afroditio. Ne estas necese esplori, ĉu fontlingva finvokalo prononciĝas senakcenta aŭ akcentita (*Kreta*, *Moskva*), ĉu kurta aŭ longa (*Tiranë*, *Tesalonikë*), ĉu ĝi apartenas al la fontlingva radiko aŭ estas nur fontlingva sufikso, finaĵo, event. alia morfemo.

Kiam L. Zamenhof transprenis komunsencajn vortojn el naciaj lingvoj, li devis kalkuli kun ŝanĝo de akcento, longo k.t.p. La germana *Monat* (legu *mōnat*) en Esperanto fariĝis "monato", alisilabe akcentita eĉ aliigita rilate longon de la silaboj. Kial oni ne procedu analoge, se temas pri propraj nomoj?

Estas vere, ke "finvokala larĝigo de la radiko" en Esperanto estas laŭokaze aplikata, ekz. kiam oni celas eviton de homonimeco (vilo kaj vilao, lupo kaj lupeo). Eble la sama motivo gvidis iujn aŭtorojn, preferi ankaŭ sfere de la loknomoj ekz. la formon Akrao (M) anst. Akro (Mu), homonima kun la komunuza vorto; simile okazis kun Limao (M) anst. Limo (Mu), Sanao (M) anst. Sano (Mu), Voltao (M) anst. Volto (We). Sed danĝero de konfuzo kun komunsencaj vortoj estas

plej ofte neglektebla. Ĉu iun ĝenas homonimeco de la duopoj Kreto kaj kreto, Kubo kaj kubo? Ĉu sole pro "homonimfobio" oni adoptu kuriozaĵojn Kretao, Kubao? Ĉu estas timinda la rivernomo Senegalo, pro sia homonimeco kun sen-egalo? Kiom da nenecesaj misformoj - el la 12 000 nomoj de PM - estus enkondukendaj!

Tamen, kelk-okaze, ankaŭ PM devis kontentiĝi pti esceptoj el sia "baza regulo". Ekz. nepre necesis, eviti konfuzon inter Sula insularo (or. de Celebo) kaj Sulua insularo (n.or. de Borneo); la plej sudan punkton de Azio, PM devis nomi Burua kabo, ne Bura, pro ebla konfuzo kun la sudafrikaj Buroj. Tiaj konfuzoj maloportune okazadus precipe dum serĉado en la registra listo.

Ekzistas ankaŭ unusilabaj originaloj finiĝantaj per vokalo. La itala rivero *Po* fariĝis en Esperanto Poo, la japanan urbon *Tsu* ne eblis esperantigi per Co; unusola akceptebla formo ŝajnis Cuo.

Ĉar PM klopodis maksimume respekti nomformojn, kiuj jam bone stabiliĝis en la lingvo internacia, ĝi ne povis ne akcepti la nomojn Peruo, Delhio k.a., kies uzado estas jam tradicie uneca.

Pro aliaj motivoj restis la larĝa formo de Sanjoseo, Santomeo; temas ja pri hispanaj aŭ portugalaĵoj nomvarioj de Jozefo kaj Tomaso. Memkomprene, Joso kaj Tomo estus tro malproksimaj de la bazaj formoj, ĵus menciitaj.

4.2. P l u r v o r t a j o r i g i n a l o j

MONDMAPO (1968), konforme al la decidoj de Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, esperantigis ĉiun loknomon-kromiuj de la fizika geografio - per formo unuvorta, farinte el plurvortaj originaloj kunmetaĵojn, preskaŭ konsekvence (tamen: Sudokcident-Afriko, Okcidentkongo, Okcidenta Samoo) sen ligostreketo: Malgrandazio, Novzelando, Sudjemenio k.a.

Tiun ĉi solvon akompanas pluraj avantaĝoj, ekz. senproblema adjektivigo: nevzelanda faŭno, sudjemenia ĉefurbo k.s. Pro aliaj solvoj oni embarasiĝas, ĉar el la strekhava formo Nov-Zelando povas fariĝi adjektivoj: Nov-zelanda, nov-zelanda, eĉ novzelanda. Similaj embarasoj aperas, se oni volas deklinacii ekz. la nomon Rio-de-Janeiro (PIV) aŭ Rio de Janeiro (LA). La originalsenca akuzativo devus esti verŝajne Rion-de-Janeiro, t.e. "Riveron de Januaro". Aŭ elekti Rion-de-Janeiron? Aŭ negelkti la originalan sencon kaj preferi Rio-de-Janeiron? Sed per la lasta formo oni jam koncedas, ke tamen temas pri unuvorta nomo, interne de kiu la ligostreketoj, same kiel la majusklo ne funkcias por memstariĝi la partojn. Do, Riodejaneiro ŝajnas esti la plej taŭga formo... Alia afero estas la urboduopo Telavivo-Jafo (PM), kies akuzativo estas Telavivon-Jafon. La ligostreko servas ĉi tie por kunligi du vortojn, samtempe konservante memstarecon de ili ambaŭ.

Ankaŭ en nacilingvoj montriĝas klara evolu-tendenco, laŭ kiu nomoj origine plurvortaj ŝanĝas sian grafismon al kunfanditaj, sen ligostreketo (*Daresalam, Hongkong, Montreal, Ulanbatar* k.t.p.). Estas nature, ke Esperanto, konforme al

siaj vortfarado kaj internacia funkcio, tiun ĉi tendencon ankoraŭ substrekas, dum la nacilingvoj realigas ĝin nur sporade kaj pli malpli hazarde laŭ spaco kaj tempo: *São Tiago* (Verdakabaj insuloj), *Santiago*, (Ĉilio), *San Severo* (Italio), *Sanremo* (Italio), *Novo Uzensk* (Sovetio), *Novosibirsk* (Sovetio), *Ha Tinh* (Vjetnamio), *Hanoi* (Vjetnamio), *Krung Thep* (Tajlando), *Krungkao* (Tajlando).

Malgraŭ la evidenta tendenco, la supre nomita komisiono estas riproĉata - pro la preskaŭ konsekvenca unuvortigo de loknomoj - de multaj aŭtoroj "ligostrek-amaj" (A. ALBAULT 1968., p.107-109, C. STØP-BOWITZ, 1969.-1970., k.a.). Nu, estas vere, ke "Luksemburgurbo" (M) por la ĉefurbo de Luksemburgio aspektas tre nekutime (A. ALBAULT, 1968., p.109); ankoraŭ pli stranga ŝajnas "Georgokvinalando" (M). Simile aspektus "Kamcatkapetropavlovsko" anstataŭ la pli natura formo duvorta: Petropavlovsko Kamĉatka (PM). Cetere, eĉ la "mondmapanoj" ne kuraĝis enkonduki ekz. formon "Skandinaviduoninsulo", aplikeblan sole en ŝercpometoj porinfanaj. Memkomprene, la koncernajn adjektivojn oni devas simpligi: petropavlovska, skandinavia.

Generaltrajte, PM klopodis obei la principon lanĉitan de M, transpreninte kunmetaĵojn senstreketajn, escepte de kelkaj tro nenaturaj ("teniecaj"). Ĝi - por kontinui kaj disvolvi la tradicion de M - enkondukis multe da pluj analogoj, ekz. Sudkarolino, kvankam Suda Karolino (PIV) estus same bona, por kelkaj aŭtoroj eĉ pli plaĉa. Sed la senpera adjektivigo en ĉi tiu kaj en multaj aliaj okazoj decidis favore al la formoj kunfanditaj.

Aliokaze, plurvorta formo ŝajnis esti unusola akceptebla solvo: Lando de Georgo V-a, Komsomolsko ĉe Amuro, Porto Hispana k.a.

4.3. La ŭsenca tradukado

Ne estas dubo, ke iuj loknomoj devas esti esperantigitaj per laŭsenca traduko. Same procedas nacilingvoj, celante esprimi ĝuste tion, kio motivigis "bapton" de lokoj. La lingvoj esprimas siarimede, ke iu maro karakteriziĝas - pli aŭ malpli objektive - per iu koloro. Neniu esperantisto plendos kontraŭ la nomo Flava maro; eĉ ne la ĉinoj mem intencas trudi al aliaj lingvoj, ke ili akceptu nomon surbaze de la koncerna ĉina vorto por "flava".

Sed jam pri la samnoma rivero enfluanta Flavan maron la praktiko diverĝas. Iuj lingvoj transskribas la ĉinan nomon *Hoangho*, aliaj tradukas laŭsence aŭ uzas ofte samtempe ambaŭ nomojn de tiu ĉi rivero.

Despli diskutinda estas ekz. la laŭsenca traduko de *Yellowstone*. Se PM lanĉas "Flavaŝtonan riveron", do surbaze de la fakto, ke la nomo anglalingva estas nenio alia ol laŭsenca traduko de l'originalo indiana. Uzi formojn Jelostono (F), Jeloŭstono, Jelovstono, Jelovŝtono aŭ aliajn, portus du riskojn: la unuan, ke transskribita formo restus verŝajne tre longe malstabila, la duan, ke esperantistoj, ne regantaj anglan lingvon, ne scius (ĉi-kaze) tre domaĝe!, kion la indianoj volis esprimi. Krome, la formoj Jelovŝtono, Jeloŭŝtono,

Jeloŝtono estus hibridaĵoj, kies unua parto formiĝis per transskribo, sed la dua per laŭsenca traduko. La angla "stone" kaj la Esperanta "ŝtono" estas ja tiom proksimaj, ke oni aŭtomate inklinas al apliko de la laŭsenca traduko. Simile oni diras Roka montaro, sed ne Rokia montaro.

Estus evidenta absurdaĵo, traduki laŭ la senco ĉiun loknomon; tamen ŝajnas al ni, ke estonte aldoniĝos pluaj tradukaĵoj, precipe el la lingvoj araba, turka, ĉina, indiana k.t.p., kies originaloj mem estas tro malproksimaj de la dominanta hindeŭropa vortotrezoro de Esperanto.

Ni jam diris en implikita formo, ke precipe ĉe la fizikgeografiaj nomoj oni devas kalkuli kun abunda tradukado laŭsenca. PM enkondukas tie ĉi kelke da novaĵoj: Lofaj kaj Mallofaj insuloj, Terfina kabo, Nadla kabo, Kruta kabo k. a. Ankaŭ urbnomaj tradukoj kelk-okaze disvastiĝis, ekz. Bonaero (Sek) por *Buenos Aires*. Analoge ni adoptis kvar nomojn laŭ la propono de S-B: Bonespero por *Godthåb*, Longjarurbo por *Longyearbyen*, Mariohaveno por *Maarianhamina*, Torhaveno por *Thorshavn*. Ni ne dubas pri ties taŭgeco; same ni ne hezitis en la kazoj: Hejma Insulo por *Home Island* kaj Flugfiŝa Golfeto por *Flying Fish Cove*. (Ĉi-loke ni rimarku, ke la vortoj Insulo kaj Golfeto estas majusklitaj, ĉar ili ne havas komunencan funkcion. Dum Ruĝa maro estas nomo de maro, Hejma Insulo estas nomo de urbo. Ankaŭ ĉe Sallaga Urbo ni sentas, ke Urbo estas parto de la urbno, sed ne nomo komunencan; eble iu kontraŭargumentos, ke ekzistas urboj Sallaga, Kaba k.a., sed ni replikos, ke la urbnoj plurvortaj ĉiam kondukas simile al la landmonoj plurvortaj: Federacia Respubliko Germanio. Cetero ne valoras tro okupigi pri la formalaĵoj kiel majusklado, se pli esencaj problemoj ĝenas nin.).

Aliflanke pluraj niaj kunlaborantoj ne konsentis pri Nordtero (*Severnaja Zemlja*) kaj Novtero (*Novaja Zemlja*) pro timo, ke povus okazi konfuzoj aŭ miskomprenoj. Sed en la paragrafo pri rusaj nomoj ni eksplikos la principon, ke PM konsekvence tradukas la epitetojn Nova kaj Norda.

5. ESPERANTIGO DE LATINSKRIBAJ ORIGINALOJ

Ni jam notis, ke ĉe esperantigo de geografiaj nomoj aperas specifaj problemoj laŭ tio, ĉu la originalo estas en lingvo uzanta latinan skribon aŭ skribon alian.

Laŭ la koncepto de la eldonisto, en afero de la latina alfabeto reduktiĝas la nombro de la tradukendaj loknoj; tial ili en la poŝatlaso troviĝas en malpli granda kvanto, ol la legantoj verŝajne atendas (kaj ankaŭ: ol la tradukintoj mem preferus). Nia kartoteko montras, ke la plej granda parto de tiuj ĉi nomoj, kiom ili estis laŭ la gvidlinioj de la eldonisto tradukendaj, havas jam sian Esperantan tradicion, kvankam ne ĉiam konsekvenca. Tiu fakto plifaciligis nian taskon kaj ni povis plejparte limigi nin je tio, ke ni klopodis trovi en la donita materialo la cefajn vojojn de la lingvouzado por apliki ilin ĉe la elektado de la uzotaj nomformoj.

Evidentiĝis, ke en la lingvopraktiko iĝis validaj du ĉefaj principoj por la esperantigo de loknoj: la unua estas

imitado de la originala fonetismo, la dua estas konservado de tia skriba bildo de la loknomo, ke ĝi estu plejeble proksima al ties originala grafismo. Tiuj du principoj tre ofte ne estas konformigeblaj pro malsama prononcado de la literoj en Esperanto kaj en la naciaj alfabetoj, aŭ pro tio, ke iuj el la literoj malestas en Esperanto. En tia kazo estas necese elekti inter ĉi ambaŭ principoj, kaj ĉar ĉe tio ofte decidas subjektivaj motivoj, en tiu sfero fakte regas kazuistiko: solvo de unu kazo ne koheras kaj ne harmonias kun alia. Sistemeco de geografia verko tamen postulas, ke la aplikado de tiuj du principoj estu - ĉe terminoj samspecaj kaj samdevenaj - plejeble konsekvenca. Krome plua kaŭzo de la malsama procedado, kiun ni konstatas en la literaturo, estas la cirkonstanco, ke unuopaj fontlingvoj adaptas la loknomojn diversmaniere, eĉ se ili estas derivitaj de la samaj etimoj, kion influas ankaŭ la naciaj ortografioj. Ni montrons nian metodon per kelkaj specimenoj.

5.1. A n g l a j n o m o j

Diferenco inter la skriba kaj la parolata vortaspektoj, do inter la fonetismo kaj la grafismo, en la angla lingvo estas tre granda, kaj ne estas eble esprimi la rilaton inter litero kaj sono per simplaj reguloj. Krome la prononcado de la anglaj latindevenaj vortoj tre devojiĝis de iliaj etimoj kiuj vivas en la Esperanta leksikono en formo pli originala. Ni demonstru tion per ekzemplo de moderna kaj moda vorto *musical*, kiu naskiĝis en la anglalingva medio kaj ankoraŭ ne estas menciita en PIV (en *We* ĝi estas tradukita kiel "muzika dramo"). Estas false esperantigi tiun vorton laŭ la fonetismo, kiel ni jam legis, do "mjuziklo" aŭ simile; sole ĝusta estas la formo pli originala, respektanta la grafismon, do "muzikalo", ĉar ĝi havas en Esperanto jam siajn parencojn: la radikon muzik - kaj la adjektivigan latindevenan pseŭdosufikson -al- (ekz. en la vorto: horizontala). Ĉe esperantigo de anglaj vortoj la respekto al la grafismo estas grandparte preferinda.

Ni akceptis *Southampton* i. (el *Southampton*); *Fretaŭno* (el *Freetown*, do ne *Fritaŭno* (M)); tamen je nia bedaŭro restis la jam ĝenerale uzata *Kvinslando* (LA, *We*, PIV kaj aliaj, el *Queensland*), kvankam konsekvence estus *Kvenslando*, simile kiel *Grenviĉo* (PIV) el *Greenwich*. (Ĉe *S* legiĝas eĉ *Kŭinslando*).

La angla -*ch*- donas laŭ la grafismo -ĉ- (vidu la jaman citaĵon el PIV: *Grenviĉo*); tial *Ĉarlesa* i., *Ĉarlota* ir. (ne *Karla* aŭ *Karola*, *Karolina*), kaj la angla -*j*-, kvankam elparolata -ĝ-, ricevis la formon -ĵ-: *Jamestaŭno* (el *Jamestown*). (Parenteze: kie la loknomo estiĝis el nomo de persono, kaj tiu persona nomo jam havas sian Esperantan sufiĉe similan formon, ni lasis tiun ĉi: *Georgtaŭno*, ne *Ĝorĝtaŭno*.) - La persona nomo *Cook* ricevis laŭ la Esperanta ortografio la formon *Kuk* (*Kuka* mt., PIV).

El la "saksa genitivo" ni konservis la literon -s- eĉ post la antaŭiranta -t- kaj ne lasis ilin kunflui en unu li-

teron -c- : Barents m., ne Barenca (M, PIV). Simile: Koutsai . (S-B). Ankaŭ ne kunfluas -d- kaj -s-, se ili apartenas al du diversaj radikoj, kunmetitaj en unu vorto: Hudsona golfo (M, PIV), ne Hucona; komparu en paragrafo 6.1 ĉe la rusaj nomoj : Bratsko, Oĥotska m.

Ni malakceptas la transliterigon de -w- (ĉe komenco de silabo) per duonvokalo -ŭ-, kiu nun estas oftiganta, malgraŭ la Fundamenta modelo, laŭ kiu *Washington* estas transliterigata per *Vaŝington*, kaj ne per *Ŭaŝington*.

5.1 Ĝermanaj nomoj

La germana -ie- transiras en Esperanton jam laŭ la Zamenhofa iniciato plejparte kiel -ie-, ne kiel -i- : Vieno (Z), biero (Z) el *Wien*, *Bier*. Tial la poŝatlaso havas ankaŭ Kielo (ne Kilo).

La germana -ü- tradicie fariĝas -u- : Nurenburgo (Z, LA, PIV) el *Nürnberg*.

La germanan -ch- ni transdonas kiel -ĥ- : Munĥeno (Z, S-B) el *München*, malgraŭ la formoj kun -k-, trovitaj ĉe aliaj aŭtoroj (LA, We; PIV havas ambaŭ formojn, preferante tiun kun -k-).

La diftongo -ei- donas -ej- /ne -aj-/ : *Liechtenstein* donas Liĥtenŝtejno (ne: -ŝtajno).

La ĝermana -z- aperas en la tradicio fonetisme kiel -c-: Vaduco (M) al *Vaduz*.

Multe da diskutoj regas ĉirkaŭ la ĝermana vokalo *ö, oe, oe, ø* : Tiel oni legas Grenlando (Z, S) laŭ rentgeno, kaj Groenlando (LA, M, PIV) laŭ oero, sed ni preferis la bone motivitan formon Gronlando (Ne, We) laŭ la modelo Kopenhago.

Aparta fenomeno estas la ĝermana plural-finaĵo -en, transiranta en la Esperantan radikon: Antverpeno (LA, PG 1938, M, We, PIV), en Antverpo, Dresdeno (LA, M, PIV); konsekvence ni akceptis ankaŭ Spicbergeno (Ar), kvankam aliaj havas nur Spicbergo (LA, M, PIV).

5.3 Latinidaj nomoj

La respekto al la grafismo, iniciatita de Zamenhof, kondukis al transskribado de la franca -ge- kiel -ĝe- kaj ne kiel -ĵe- laŭ la originala prononco : Alĝero (Z, M, PIV) el *Alger*, ne Alĵero.

La franclingva fina -s akceptas la Esperantan formon -z- : Parizo el *Paris*, Kalezo (PIV) el *Calais*, Toreza mk. (el *Torres*), Laperuza mk. (el *La Pérouse*).

La fina konsonanto, kiu en la franca prononco ne estas elparolata, reaperas ĉe la esperantigo: Boforta m. (PIV), el *Beaufort*, ne Bofora (M).

Tamen la fina -ion ĉe la franclingvaj nomoj ne transiras kiel -iono, sed kiel simpla -io : Reŭnio (PIV), el *Réunion*, ne Reŭniono. Simile Ascensio. Alie estas ĉe la hispandevena Asunciono (M, PIV), kvankam la formo Asuncio ankaŭ estus defebdebla.

La litergrupon -dj- en nomoj de la franclingva sfero ni ŝatus transskribi kiel -dĵ-, por proksimigi al la originala

gratismo, kio ankaŭ plifaciligus la serĉadon en la registro; sed tiu procedo ne havas subtenon en la literaturo. Tial ni restigis Ĝibuto (PIV havas : Ĝibutio).

Por la franca vortero-*ville* (trovebla ankaŭ en la loknomoj anglaj), per kiu finiĝas multaj nomoj de urboj, ni akceptis la formon - villo; ĝi estas etimologie parenca kun la latina *villa*, signifanta "kampara bieno" (do kerno de pli posta civito), kiun Zamenhof transprenis kiel villo (registrita en PIV).

En la hispana lingvo la prononcado de -c- estas pli proksima al la Esperanta -s-, tamen la tradicio sendube sekvas la grafismon kaj skribas: Barcelono (S, LA, PG 1938, M, PIV), ne Barselono; Valencio, ne Valensio. Simile estas pri la hispana -z- : kvankam iuj emas transskribi ĝin per -c-, la plejparto imitas la bildon de la vorto kaj skribas: Venezuelo (PG 1938, LA, We, M, PIV), ne Venecuelo. Kun bedaŭro ni lasis la formon Acoroj (LA, We, M,) - el *Azores*, ĉar tiu grave superregis en la literaturo; tamen ne estas ekskludite, ke pli posta evoluo direktigos al unueco (PIV registras ambaŭ formojn, kun -z- kaj kun -c-, preferante tamen tiun duan).

Speciala fenomeno estas la latindevena -qu-. Tiu transiras en Esperanton kiel -kv- ne nur, se sekvas la duraj vokaloj a, o, sed ankaŭ se sekvas la molaj: e, i: kvanto, kvociento, kverelo, kvinto. Laŭ tio troviĝas ĉe Zamenhof Gvadalkviviro, (el *Guadalquivir*), ne Gvadalkiviro (PIV). Tial ennia poŝatlaso troviĝas Kvito (el *Quito*), ne Kito (M).

La hispanlingva bilabiala -b- estas transskribata kiel -v- : Havano (LA, B, M, PIV) - el *Habana*, Kordovo (S, L, PIV) - el *Cordoba*.

Kvankam PIV akceptas la latinidan pluralan finaĵon (-es, -as, -os) en la Esperantan radikon (Celebeso, Karakaso, Honduraso, Barbadoso...), ni ne adoptis tiun manieron kaj kreas la Esperantajn nomojn sen tiu finaĵo: Celebo, Karako, Honduro, Barbado... Por tio pledas ankaŭ A. ALBAULT (1968) kaj pluraj korespondantoj hispandevenaj.

A. THOMSON (1960) prezentis interesan proponon: "Tre granda nombro da nomoj komenciĝas per diversaj formoj de la vorto Sankta, kiu estas men iom peza vortelemento. Mi sugestas, ke en ĉiuj tiaj nomoj ni uzu la silabon 'San' kvazaŭ prefikson, foje aparte, foje kunfandite". Tiun proponon akceptis M, konsekvence aplikante la formon kunfanditan. La sugesto de Thomson al ni ŝajnas oportuna: ĝi estas konciza, belsona kaj memorigas la ĥemiajn prefiksoidojn 'nitro-', 'oksi-', 'sulfo'- anstataŭ la kompletaj radikoj 'nitrogen-', 'oksigen-', 'sulfur-'. Ankaŭ PIV uzas tiun mallongigon, tamen nur, se la origina formo estis itala, hispana aŭ portugala. Por la franc-lingvaj loknomoj tiu procedo ŝajnas al G. Waringhien malmulte komprenebla. Ni ne partoprenas tiun opinion kaj uzastion prefiksoidon 'San-' ankaŭ en la sfero de la franca lingvo: Sanpiero - el *St. Pierre*. Ja, ni opinias, ke ĝi estus aplikebla ankaŭ kiel Esperanta ekvivalento de la latindevena vorto *Sankt* ĉe la germanaj loknomoj.

6. ESPERANTIGO DE NELATINSKRIBAJ ORIGINALOJ

6.1. A z b u k a j n o m o j

Temas ja plej multe pri nomoj ruslingvaj. Se oni aplikus normigitan sistemon de transskribado el azbuko, oni elbe ne bezonus solide esplori etimologion kaj morfologion de la rusaj nomoj. Per meĥanika transliterigo riceviĝas ekz. *Vjatskije Poljani*, nomo en Esperanto apenaŭ fleksebla. Apud ĝi ekzistus la riveronomo *Vjatka*. Sed se oni scias, ke *vjatskij* estas adjektivo al la feminina nomo *Vjatka*, oni inklinas asimili ambaŭ nomojn jene: la rivero Vjatko, la urbo Vjatka Poljano (PM). La markolo inter Japana kaj Oĥotska maroj nomiĝas *Tatarskij*, de Tatara (ne Tatarskaja!) markolo, ĉar estas natura postulo, ke la geografiaj nomoj reciproke koheru: la soveta respubliko nomiĝas Tatara (ne Tatarskaja!), en Esperanto.

Se ni jam ekskursis Ekstreman Orienton, ni ankoraŭ por momento restu tie. Oĥotska maro nomiĝas laŭ la urbo *Oĥotsk*, substantivigita adjektivo al la tribnomo *Oĥot*. Tiu ĉi tribnomo estas derivita el la urb-nomo *Oĥa*. La formoj asimilitaj do estas: Oĥo, Oĥoto, Oĥotsko, Oĥotska maro, ne "Oĥocka" (LA, M, PIV). La meĥanika transliterigo de "ts" per "c" estus ĉi-kaze grava eraro. (Samspeca kripligo estus transformo de Hudsona golfo al "Hucona"!); La eraro devenas de la fakto, ke iuj lingvoj transskribas la azbukan "c" per "ts". Inverse, ili ne kapablas distingi inter "c" kaj "ts" originalaj, inter *Kuzneck* kaj *Bratsk*.

Per ĉio ĉi ni volis emfazi ĝeneralan principon, ke bone esperantigita loknomo estas atingebla antaŭ ĉio surbaze de fontlingvaj konoj.

PM prezentigas kiel unua pli ampleksa provo pri esperantigo de la rusaj nomoj. Sen apogo sur *E. BOKAREV* (1966) kaj *D. ARMAND* (1962, 1963, 1969, sed precipe 1970), la tasko ne estus plenumeblo. Tamen, da problemoj restis abunde; ni esperu, ke laboron super la dua eldono de PM partoprenos ankoraŭ kelkaj aliaj, same oferemaj kompetentuloj, helponte solvi ilin.

Unu el tiuj problemoj estas la jotacio, tre karakteriza fenomeno de la slavaj lingvoj, precipe de la rusa. Esperanto - ĝenerale dirite - ne tro ŝatas la jotacion post konsonanto. Vortoj kun bj, cj, ĉj, dj k.t.p. ja ekzistas: Bjalistoko (Z), paĉjo (Z), sed ne abundas. Kontraŭe, pli multe disvastiĝis formoj sen jotacio: Sovetio (W), ne Sovjetio (LA); Dnepro (B), ne Dnjepro (M); Dnestro (PIV), ne Dnjestro (LA); Odeso (LA, B, M, PIV), ne Odjeso (?). Sed la afero ne estas tiel simpla. Se oni diras Bulonjo, kiel oni ne diru Kubanjo (B)? Male, oni diras Astraĥano (LA, PIV), ne Astraĥanjo. Ĉi-okaze, ni ne povas rezisti al la tento, ke ni citu ideon el letero de W, adresita al unu el ni: - Mi opinias, ke en la propraj nomoj (cetero kiel en la elekto de la formo de neologismoj) la rigidaj reguloj de transskribo ne estas pli aplikeblaj, ol la imagitaj "fonetikaj" reguloj iam estis en la efektiva evoluo de la fonemoj. - Jen pravega konstato, bedaŭrinde ne li-

beriganta nin de respondeca klopodo por "krei laŭeblean ordon".

Ellaso de "j" estas tre dezirinda en ĝenaj konsonant-grupoj. Laŭ rekomendo de Ar ni elektis la formon Cimlansko, ne Cimljansko; Kluĉo, ne Kljuĉo; Roslatino, ne Rosiljatino; k. t. p. Aliokaze, kie konsonantoj ne grupiĝas, ni konservis la originalan jotacion: Ljuberco, Ljudinovo k. s. Tamen ni ne eskludas, ke, sub premo de kritikaj voĉoj, oni eble forigos "j" ei ĉi-specaj nomoj, en venonta eldono de PM.

Ne akceptebla estas la intervokala "j" sekvanta la vokalon "i": Feodosio, ne Feodosijo; Valmiero, ne Valmijero.

La jotacia demando, same kiel la pli supre menciita distingado de "ts" kaj "c", sufiĉu - en kadro de nia artikolo - por demonstri problemojn. Ankaŭ morfologiajn ni jam tuŝis parolante pri rusaj adjektivoj. Ĉi-loke, ni aldonu, ke ne ĉiu nomo finiĝanta je maskulina sufisko *-skij*, feminina *-skaja*, neŭtra *-skoje*, plurala *-skije* estas traktebla kiel adjektivo. Multaj loknomoj estas substantivigitaj adjektivoj, ekz. la jam menciita *Oĥotsk*, signifanta la rusan adjektivon (=Oĥota), sed esperantigebla sole kiel substantivo: Oĥotsko. Tre instruiva ekzemplo estas la jam antaŭe tuŝita *Petropavlovsk Kamĉatskij*, esperantigenda per Petropavlovsko Kamĉatka. La unua vorto estas substantivigita adjektivo, sed la dua estas vera adjektivo epiteta. Jen kial oni esperantigas ili diference. Analoge: Aleksandrovsko Saĥalina, Pokrovsko Urala k. a. En la rusa lingvo ekzistus ja ankoraŭ aliaj adjektiv-sufiksoj: *-nij*, *-noj*, *-naja*, *-noje*, *-oje*, *-ije* k. a. Tiel ni ricevas nomojn: Ugolnio, Narodnajo, Glubokojo, sur kiuj oni povas tuj distingi maskulinan, respektive femininan aŭ neŭtran genron de l'originaloj.

Krom laŭ epitetoj derivitaj de aliaj loknomoj (Urala, Saĥalina, Kamĉatka, Siberia, Vjatka, Kaŝira k. a.), PM laŭsence tradukas - surbaze de praktiko kutima en Esperanto - sole la plej banalajn: Granda, Malgranda, Nova, Malnova, Supra, Malsupra, Norda, Suda, Orienta, Okcidenta. Sed tio ne koncernas originalojn, en kiuj adjektiva epiteto jam kunfandiĝis kun le baza nomo substantiv-forma: Starobelsk = Starobelsko kaj ne Malnovbelsko, sed Starij Oskol = Malnova Oskolo.

Fine unu el subtilaĵoj, solvitaj dank'al Ar: *Novgorod Severskij* = Novgorodo Severskia. Ne temas pri *Severnij* = Norda, sed pri *Severskij*, laŭ nomo de fabela princo. Eĉ rusoj kelkiam erare konfuzas, laŭ aserto de Ar. Kiom da danĝeroj embuskas kompatindan esperantiganton!

6.2. B u l g a r a j n o m o j

Preskaŭ la samaj principoj aplikiĝis al la nomoj bulgaraj. Jen: Smoljano, Kjustendilo, Malnova Zagoro (originale *Stara Zagora*), Kamĉio (ne Kamĉijo). La specife bulgaran literon en la vortoj *Tărgoviște*, *Veliko Tărnovo*, *Kărgali*, PM transliterigas, laŭ la rekomendo de Ni, baziĝanta sur informoj de Instituto de Bulgara Lingvo, per "a": Targoviŝto (ne Tîrgoviŝto, Turgoviŝto), Granda Tarnovo, Kargalo. Escepton faras la landnomo mem: Bulgario, kiun oni ne plu rajtas modifi al "Balgario".

6.3. Ĉinaj nomoj

Jen alia danĝera tereno, trairebla sole por homoj de bona nerva konstitucio. Eĉ la Ĉinoj mem ne kontestas, ke la fonetika diverseco de iliaj dialektoj prezentas gravajn problemojn (kp. J. JUDI, 1964, p.235). Ne mirige, ke PM, laŭ la modelo de PIV, senrezerve submetis sin al la sistemo, ellaborita de Ĉina Esperantigo-Ligo kaj sukcese praktikata de la gazeto EL POPOLA ĈINIO. La sistemo baziĝas sur esperantigo de H.F.A. (hanlingva fonetika alfabeto, aprobita de Ŝtata Konsilio kaj de Nacia Popola Kongreso); ĝi ebligas facilan retrovon de nomformoj en la ĉinaj ideografiaĵoj.

Ĉi-rilate, ni ne kaŝu la gravan mankon, pri kiu avertis jam W en la PIV-antaŭparolo: En la pekina dialekto ne ekzistas la voĉaj konsonantaj (b, d, g), do H.F.A. uzas la koncernajn literojn por redoni la senvoĉajn konsonantojn (p, t, k), kies literoj esprimas aspiraciajn konsonantojn (ph, th, kh). La praktika sekvo de tiu ĉi konvencio estu demonstrita per du ekzemploj: Ĉina esperantisto skribas *Guangdong*, sed prononcas *Kuantun*, do diference de esperantistoj alilandaj. *Tiangin* estas prononcata fare de la Ĉinoj *Thiankin*. Ĉar PIV kaj MP preferis kapitulaci ol mem ellabori sistemon tre verŝajne dubindan, ili fakte aprobas malunuecan prononcadon en Esperanto. Aliflanke, la kapitulaco forigas sennombrajn problemetojn. Oni povas neglekti formojn aperintajn en pli frua literaturo. Jangceo (LA, Ra, J) aŭ Janceo (M) fariĝas en la supre menciita sistemo *Jangzi-rivero* (J, PIV); Sinkiango (M) fariĝas *Hingiang* (J, PIV); Tjen-Ŝanaj Montoj (S) aŭ Tjenŝano (M) fariĝas *Tianŝan* (J, PIV) k.t.p.

Tamen, diference de la ĉina sistemo kaj de la iom malkonsekvenca PIV-praktiko, PM kuraĝis gravan paŝon, nome anstataŭon de la neasimilitaj formoj per asimilitaj, laŭ la ĝenerala koncepto, kiun preskribis la eldonejo *Kartografie*; tiu ĉi koncepto (kp. la paragrafon pri elekto de tradukendaj nomoj) antaŭvidas iom-post-ioman anstataŭadon de neasimilitaj formoj, eĉ de tiuj, kie kongruas la anglalingva kaj esperantlingva transskriboj. Do ankaŭ ekz. Kunming (J, NV, PIV) fariĝos pli poste Kunmingo (Mu).

J. JUDI (1964, p.237) skribas: "De kelke da nomoj ni konservis la formojn jam kutimiĝintajn por ĉinaj esperantistoj, nome: Pekino, Nankino, Ŝanhajo, Kantono." Memkomprene, tiuj ĉi nomoj eniris ankaŭ nian poŝatlasojn. Nur ni atentigu pri almenaŭ unu malkonsekvenco rezultanta el tio, ke Ĉinoj esperantigas la urbon Kantono, sed por la provinco konservas la formon *Guangdong*. PM, cele de homogenigo, preferus tute por la provinco la nomon derivitan de l'urbo: Kantonio, analoge al Novjorkio, Parizio k.t.p.

Same estas aprobinde, ke J (l.c. p.238) iujn nomojn ne transskribis laŭ la sono, sed tradukis laŭ la senco, ekz. Flava rivero, t.e. Hoanho (M), Hoangho (Ra), akorde kun Flava maro.

6.4. J a p a n a j n o m o j

Ili ne prezentas tiom da problemoj. Iomete embarasa, simile al nomoj azbukaj, estas la jotacio. Dum en kelkaj plej bone konataj nomoj, ekz. Tokio (LA, B, M, PIV, Mu) kaj Kio-to (M, Oo, PIV, Mu) stabiligis la transskribo de angla "y" per esperanta "i", kvankam temas pri prononcata "j", ne kreanta silabon, en aliaj nomoj, ekz. Rjukjuaj insuloj (M: Rukjuo, J: *Rjukju*-insularo) kaj Kjuŝo (M: Kjuŝuo, Oo: *Kjuŝu*) oni pli fidele obeas al la originala prononco. Tiu ĉi dualismo apenaŭ malaperos; ni tre dubas, ke Esperanto - por uniformigi la transskribon - akceptos la formojn aŭ Tokjo, Kjoto, aŭ Riukiuaj insuloj, Kiuso.

En japanoj nomoj aperas ofte la duopo "-ij-" plus vokalo; al Esperanto plej konvena transskribo estas forigo de "j": *Miyako* = Miako. Bedaŭrinde, eĉ en tiu ĉi okazo ne regas unueco, ekz. Mijazako (Oo: *Mijazaki*), Mijakeŝimo k.a. Estus tre dezirinde - ĉar ne temas pri nomformoj stabiligintaj en Esperanto - konsekvence forigi "j" (la anglan "y") en la koncernaj litergrupoj (Miazako k.s.), simile kiel oni transskribas la bulgaran *Sofiĵa* per Sofio, la jugoslavan *Metohiĵa* per Metoĥio, la rusan *Aleksandriĵa* per Aleksandrio k. t.p.

La transskribo de "w" per "v", ne per "ŭ" estas preskaŭ memkompreneblaĵo, se ni konsideras la Fundamentan nomon Vaŝingtono. Cetere v. la paragrafon pri latinskribaj originaloj.

Ne tiom facila estas la transskribo de "j" (la angla). Ĉu per "ĝ", fidele al la japana prononco, aŭ per "ĵ", perkonservi grafisman similecon de l'anglalingvaj formoj? Ŝajnas, ke oni devus procedi malsame en Hindio kaj Japanio; en Japanio, angla lingvo ja ne estas oficiala, sekve ortografia simileco ne tiom gravas. PM do prezentas la nomon *Wajima* per Vaĝimo. Aliflanke, la nomo de la mondkonata monto troviĝas en la literaturo kiel *Fuĵi*-monto (LA, PIV) aŭ *Fujimonto* (M). La formo *Fujisano* (PM) apogas sin sur nacilingvaj versioj de la poŝatlaso, ekz. angla *Fuji san*, ĉeĥa *Fudžiŝan* k.t.p. Japanoj mem nepre devus diri ion pri tio ĉi.

6.5. A r a b a j n o m o j

Bonŝance, sur tiu ĉi kampo efike helpis nin du kunlaborantoj tre kompetentaj (N. ISAAC, 1967, 1969-1970, (I. CHIU-SST, 1970). El Esperanto-literaturo estas rekomendindaj ekz. A: BRACKE (1968) kaj V. SETALA (1968).

Interalie nia diskutado koncernis nomojn kun tradukebla signifo. Da tiaj estas granda parto, ekz. *bab* = pordo, *bur* = haveno, *dar* = domo (*Dar es Salaam* = Domo de la Paco), *suk* = vendejo, k.t.p. Ni interkonsentis (v. ankaŭ la paragrafon 4.3. pri laŭsenca tradukado), ke nur tre malofte oni traduku, ekz. S: Blanka Nilo (M: Blankanilo, PIV: Nilo Blanka) por *Bahr el Abiad* kaj *Bahr el Jebel*; S: Blua Nilo (M: Blunilo) por *Bahr el Azraq*; Hafuna kabo (PM) por *Ras Hafun*; Natrona

valo (PM) por *Wādi el Natrūn*, k.t.p. Estas verŝajne, ke pluaj arabaj nomoj, laŭsence tradukitaj, venonte aldoniĝos.

Dua problemo estis jena: ĉu respekti formojn indiĝenajn, ĉu internaciajn? Kaze de Eŭfrato kaj Tigriso, ni ne hezitis adopti la internaciajn (S, LA, M, PIV), rifuzinte la formojn *Al Furāt* kaj *Dijlah*. Aliflanke Mosulo (LA, PIV) ne estis tiel facile decidebla, ĉar niaj arabaj kunaŭtoroj pliedis por la formoj Maŭselo, resp. Maŭsilo. Male, Bursaido (Haveno de Saido) venkis super la tradiciaj eĉ internaciaj, sed en Esperanto nestabiliĝintaj alternativoj: Portsaido (S), Port-Saido (LA), Porto-Saido (PIV). Analoge enkondukiĝis Burfuado, Bursudano, Buremo (I). Ankaŭ pluaj plurvortaj originaloj transformigas en PM al kunmetaĵoj: Daresalamo (M, Chi, Mu), Derezuro (I), Demzuberio (I), Ksarasuko (Chi) k.m.a.

Solidan pripenson postulis ankaŭ la originalaj finaĵoj "-ah", resp. "-ā". Estis evidente, ke la nomojn *Badanah*, *Khurraybah*, *Sakākah* k.a. ni ne povas esperantigi per Badanaho k.t.p., sed devas asimili per Badano k.t.p. Same, *Al Makkah* fariĝis Mekko (S, LA, PIV), ne Makkāho aŭ Mekkaho. Tute analoge estas traktendaj *Mukalla*, *Rafha*, *Sabya*, *San'a* k.a., kies Esperantaj formoj estas Mukalo, Rafho, Sabjo, Sano (Mu), ne Mukalao, Rafhao, Sabjao, Sanao (M)k.a.

El transliterigaj problemoj elstaras tiu de la prononcata "ĝ". La landoj sub influo de la franca lingvo skribas "dj", dum la landoj "anglofilaj" esprimas la samon per "j". Cetere v. ankaŭ la paragrafojn 5. kaj 6.4. Tial oni ne miru, ke en Tunizio ekzistas la konata Ĝerida Sallago (*Chott el Dj-erid*), de kie la bravulo *Kora ben Nems* en la romano de K. May aventuro vojaĝis al la saŭdarabia Ĵido (*Jiddah*). Esperanto ja kapablas unuformigi tiun ĉi duspecan transliterigon de unusola araba fonemo, sed per ĝenerala enkonduko de "ĝ" difektiĝus la internacie konata grafismo de multaj arabaj nomoj. Tro meĥanika procedo naskus formojn ne malpli stranganjn ol Ĝamajko kaj Ĝamestaŭno anstataŭ la pli naturaj Ĵamajko kaj Ĵamestaŭno.

Fine pri "aw". La laŭprononca transskribo estus "o";kp Doho (M) por *Ad Dawhah*. PM tamen preferis "aŭ", ree por indulgi la internacian aspekton grafisman: Daŭho. Simile ĝi procedis okaze de la saŭdarabia urbo *Al Jawf* = Ĵaŭfo. Por distingiĝi, la libia *El Jauf* aperas kiel Ĵofo.

7. LANDNOMOJ

"Inter la ankoraŭ nesolvitaj demandoj, la landnoma demando... estas la plej ĝena, kaj estis iam eĉ la plej akra, kiu dividis la esperantistojn" (G. WARINGHIEN, 1959, p.175). Preparante la Esperantan tekston de la poŝatlaso, ni devis ankaŭ en tiu demando preni starpunkton, kiu estus la plej eble unueca, homogena, kaj konsiderus la tendencojn, kiuj plej klare evidentiĝas en la ĝisnuna lingvoevoluo, samtempe respektante la internacie rekoneblajn formojn de la ŝtatnomoj. Ĉar tiaj starpunktoj povas esti pluraj kaj reciproke kontraŭdiraj, estas neeviteble, ke nia voĉo estas nur unu inter multaj, kaj sekve ni ne arogas al ni, ke ni solvis por ĉiam,

kio sub la nunaj cirkonstancoj ankoraŭ ne estas definitive solvebla.

La ĝisnunaj studoj de la landnoma demando montris gravan diferencon inter la nomoj kun primitivaj (simplaj) radikoj, ĉe kies pluformado oni uzas la sufikson -an- por nomi la loĝantojn, kaj nomoj devenigitaj de aliaj nocioj, do kiuj mem estiĝis per pluformado.

7.1. Landnomoj primitivaj

La plej granda nombro de la modernaj landnomoj, pri kiuj temas en nia poŝatlaso (ĉar ĝi ne okupiĝas pri regnoj historiaj), estas nomoj kun primitivaj (simplaj) radikoj. En Eŭropo ili estas malmultaj: ekz. Andoro, Islando, Liĥtenŝtejno, Sanmarino, Malto, Nederlando; ili pli abundas en Azio: Birmo, Cejlono, Cipro....; dum en Afriko ili dominas: Angolo, Bocvano, Burundo, Dahomeo... Multaj landnomoj de tiu tipo troviĝas ankaŭ en Ameriko: Kanado, Kostariko, Kubo, Argentino, Brazilo, Peruo..., kaj fine ankaŭ en Oceanio: Fiĝioj, Naŭro, Novzelando... Kompreneble, en tiun kategorion apartenas ankaŭ multaj politikaj unuoj, kiuj estas membroj aŭ partoj de ŝtato: Alasko, Hercegovino...

Ĉe la nomoj de tiu tipo oni diras, ke "la terloko nomas siajn loĝantojn" (*E. BOIRAC, 1909, p. XIX*). Espereble tiuj ĉi primitivaj landnomoj ne renkontos principan oponon. Eventualaj disopinioj versimile direktiĝos aliflanken, nome, ĉu la radikoj estas taŭge elektita, do: ĉu Maŭritanio (LA, M), Maŭretanio (S), aŭ kunmetite Maŭrlando (PIV); ĉu Barbado (A), aŭ Barbadoso (M, PIV); ĉu Jamajko (Ra), aŭ Jamaiko (LA, We, M, PIV), aŭ Jamajko (Mul); ĉu Kongo (M sub formo Orient-kaj Okcidentkongo), Kongolo (PIV), aŭ tamen kunmetaĵo, resp. derivaĵo: Kongolando (W, Sa), Kongio (PM, Sa) k.t.p.

En futuro la nombro de la primitivaj landnomoj certe ankoraŭ kreskos. Tiel ĵus nun, jam post presigo de la poŝatlaso, oni ekuzas la nomon Namibio anstataŭ Sudokcidenta Afriko.

E. BOIRAC jam en la 1909. starigis por la geografia terminaro de sia Plena Vortaro la principon, ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso "-an-". Same *M. BUTLER (1947-1949)*.

El leksikologia vidpunkto pli problemoriĉa estas la kategorio de la landnomoj devenigitaj.

7.2. Landnomoj devenigitaj el geografiaj nocioj

Oni ne malofte staras antaŭ tasko nomi teritorion laŭ alia geografia nocio: monto, rivero, lago, urbo... Ĉi tie proponiĝas la pseŭdosufikso -io, kiun por tiu celo iniciatis *Zamenhof* (*Z, 1962, p. 15*): "Por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj similcirkonstancaj landoj, t.e. nomi la urbon 'Meksiko' kaj la landon 'Meksikio' (kiel Alĝero - Alĝerio, Tuniso - Tunisio k.t.p.)." Ankaŭ la nomo Nigerio (el Nigero) estas Za-

menhofa. PG 1938 nomas tiun pseŭdosufikson "Zamenhofa sufiksoido por formi la nomon de lando el samnoma ĉefurbo aŭ rivero". Ni aldonu, ke tiu sufiksoido estas en Esperanto jam dekomence hejma por formi nomon de scienco, okupiĝo aŭ spirita direkto el nomo de ties reprezentanto: agronomo - agronomio, biologo - biologio, demokrato - demokratio; plie por formi nomon de tekniko el la nomo de karakteriza instrumento: mikroskopo - mikroskopio. Apliki la saman metodon por nomi teritorion laŭ alia geografiaĵo estas, post iniciato de la lingvoaŭtoro mem, nur konsekvence.

Oni avertas, ke la vortfino -io kaj la simpla -o (agronomo apud agronomio) signas du malsamajn radikojn kaj ke -io ne estas vera sufikso, ĉar ĝi havas anomalian formon kaj ne povas roli kiel sendependa radiko (Bu). Ni koncedus, ke Alĝerio estas vorto memstara apud Alĝero, sed laŭ nekontestebla intenco de *Zamenhof* temas pri nomenklatura procedo, per kiu oni nomu unu objekton laŭ alia. Se oni metas tiun teoriant demandon, do ni eldiras nian opinion: nome, ke la formo: kun -i- en tiuj ĉi kazoj estas pliigita radiko (radikalo), sekve ke tiu -i- rolas kiel (pseŭdo)sufikso.

Tiel en nia posatlaso estas nomitaj ekzemple:

- laŭ rivero: Jordanio (Z), Kongio (Sa), Senegalio (PIV), Voltio (PM);
- laŭ montaro: Libanio (LA), Kamerunio (PIV);
- laŭ altplataĵo: Matogrosio (PM);
- laŭ insulo: Havajio (PIV);
- laŭ lago: Ĉadio (PIV);
- laŭ urbo: Luksemburgio (Z), Meksikio (Z), Panamio (PIV), Singapurio (Ra)...

Se en Pacifika oceano oni nomas la insulmondon Oceanio, kial ne nomi la kontinenton en la antarktaj regionoj Antarktio? Atentu: Al la ĉirkaŭpolusaj regionoj (arkto kaj antarkto) apartenas partoj de la terglobo interne de la polusaj cirkloj kun areo po 21 189 000 km². Sed ĉirkaŭ la suda poluso kuŝas ankaŭ kontinento ampleksanta 14 032 064 km², kiu bezonas sian nomon. Ne taŭgas Antarkto (M), ĉar temas nur pri ties parto; nek Antarktido aŭ Antarktiko, ĉar la pseŭdosufiksoj -ido kaj -iko ne estas uzataj en Esperanta topografio kiel deriviloj. Antarktio estas solvo konforma al la plej vaste aplikebla kaj plejeble sistema nomfarado.

Nu, la pseŭdosufikso -io jam longe servas en maniero multe pli larĝa: ĝi estas uzata por krei propran aŭ komunan nomon al teritorio el komunuza substantivo. El patro deriviĝas patrio (apud la pli malnova patrujo), el Esperanto devenas Esperantio, el vojevodo vojevodio. Tiu procezo ankoraŭ ne estas formita. En la ĵus aperinta traduko de *La tempesto* de Shakespeare fare de K. KALOCSAY (1970) legiĝas sinjorio (sinjor-regno, urbo-regno), kaj ni jam vidis ankaŭ la vortojn Luksemburga Granddukio (A). Ni scias imagi, ke ankoraŭ pluj analogaj derivaĵoj estos lanĉitaj. Sekve tiu pseŭdosufikso helpis formi mallongigon Eburio (PIV) apud la plena Eburbordo kaj Sovetio apud la oficiala Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj.

Ne ekzistas alia alternativo, kiu estus same vaste uz-
ebla por nomi teritorion laŭ alia nomo geografia. Iam oni po-
vas eviti la problemon per perifrazo: Rura baseno (PM) aŭ Ru-
rvalo (PIV), iam per ripetado de la monotona kombino kun la
vorto -lando. Sed ni opinias apenaŭ akcepteblaj la formojn
Senegallando, Kamerunlando, same kiel Alĝerlando, Luksembur-
glando. Tamen ni uzis: Niĝerlando (PIV) por *République du*
Niger apud Niĝerio (PIV) por *Federal Republic of Nigeria*;
ties kaŭzo estis neceso distingi inter du regnoj.

Iuj rezignas distingi inter la nomo de lando kaj de ĝia
geografia etimo; tiel ni trovas Kameruno por nomo de ŝtato
(M), kaj ankaŭ aliloke por nomo de monto (PIV). Alia vojo es-
tas doni nomojn malsamradikajn al ambaŭ nocioj: la monto es-
tu Lebanono (PIV) kaj la ŝtato Libano (PIV). La montaron Li-
bano konas S, We. En M oni preferas vortkombinaĵojn, lasan-
te la originan formon al la regno kaj esprimante ties etimon
per aldona vorto: Meksiko - Meksikurbo, Panamo - Panamur-
bo, Luksemburgo - Luksemburgurbo (tamen: Alĝerio - Alĝero,
Tunizio - Tunizo); Orientkongo kaj Okcidentkongo - Kongori-
vero. En M estas rare uzita ankaŭ la sulfikso -ujo, kiu por
ĉi celo estas sentradicia kaj malmulte taŭga: Moravujo (M),
kvankam ne ekzistas gento Moravoj, sed rivero Moravo.

Ni opinias, ke sekvenda estas la vojo montrita de *Zam-
enhof* (vidu la supran citaĵon), kiu ebligas plej multe sis-
temigi la devenigadon de la landnomoj en geografio. Tiun pr-
incipon, enkondukitan unuafoje por la duopoj ĉefurbo - ŝta-
to (Alĝero - Alĝerio), ni aplikas ankaŭ ĉe teritorioj, kiuj
havas karakteron de membroj en federacio: Vaŝingtono - Vaŝ-
ingtonio (tamen distingu de Vaŝingtonlando en Antarktio) aŭ
de grandaj bazaj unuoj de administra divido: Parizo - Pa-
rizio (PG 1938, p.104), Selengo - Selengio (PM). Tamen sekvi
tiun vojon eĉ en pli detala nomenklaturado ŝajnas jam troigita. Ti-
al ni lasas la saman nomon al rivero kaj al la urbo, kiu es-
tas laŭ ĝi nomita aŭ inverse (ekz. Ivalo).

Ni konfesas, ke ni iukaze uzis artifikon por konservi
tradiciajn nomojn de la ŝtatoj, origine baptitaj laŭ samno-
maj fluoj. Tiel en PM legiĝas: Paragvajo, Urugvajo, Gambio
apud Paragvaja, Urugvaja, Gambia riveroj.

La metodo de nomkreado per la pseŭdosufikso -io ne es-
tas aplikata tie, kie la politika teritorio estas identa kun
la samnoma geografia nocio (insulo, duoninsulo), aŭ preskaŭ
identata kun la samnoma urbo, kies nomon ĝi akceptis. Tial ni
havas Cipro, Cejlono, Alasko, Malto, Tongo..., Sammarino, Hong-
kongo. Ni koncedas, ke el tiu vidpunkto estas diskuteble, ĉu
ne sufiĉus Singapuro anstataŭ Singapurio.

7.3. Landnomoj devenigitaj el nomo de loĝantoj

Nun ni venas al alerga punkto, kiu siatempe fariĝis
"pomo de kverelo" inter la esperantistoj. Temas pri proble-
mo, kiel formi landnomon baze de nomo de l' enloĝanta popolo.
La problemo estis vaste kaj pasie diskutata kaj ni, resend-
ante al la literaturo (Boi 1909., Mo 1910., Z 1911., Bu 1947-

1948., PG 1938., 1958., T 1959., W 1959., LA 1961., Ar 1962., 1963., 1969., PIV 1970. kaj aliaj), limiĝas nin en tiu ĉi komentario je eksplikado de nia metodo kaj prezento de niaj motivoj.

El LINGVAJ RESPONDOJ (Z 1962., p.14) ni scias, ke *Zamenhof* destinis la sufikson -ujo por nomo de landoj opinia-taj "propraĵo de unu gento" (li parolas pri "gento-mastro", dum la aligentaj landloĝantoj estas tie "gentoj-fremduloj"). Kvankam granda parto de la lingvouzantoj scie-nescie ekiris vojon malpli striktan, aplikante tiun sufikson ankaŭ por "nacioj" en senco politika kaj ne sole etnologia, kaj kvankam *Zamenhof* por tri eŭropaj regnoj, por kiuj tiu sufikso "estas tute logika" (Aŭstrujo, Belgujo kaj Svisujo) akceptis ĝin pro jam tro forta alkutimiĝo almenaŭ provizore "ĝis la Akademio trovus necesa anstataŭigi ĝin per 'i'", ni opiniis, ke en sistema geografia verko oni ne povas resti sur duona vojo kaj krome ke Esperanto ne povas solvi la politike tiklajn demandojn pri "gentoj-mastroj" kaj "gentoj-fremduloj" en la hodiaŭaj ŝtatoj.

Rim.: Por montri delikatecon de tiu problemo, ni prezentu la kazon pri Ĉeĥoslovakujo - Ĉeĥoslovakio: Inter la du mondmilitoj, oficiale validis la tezo, ke la Ĉeĥoj kaj la Slovakoj estas du branĉoj de unu slava gento nomata Ĉeĥoslovakoj, kiuj do, laŭ la terminologio de *Zamenhof*, donis la nomon al sia regno, en kiu ili estis "gento-mastro". Tial la nomo Ĉeĥoslovakujo en tiu tempo estis regula kaj pravigita. Sed post la dua mondmilito tiu tezo falis. La Ĉeĥoj kaj la Slovakoj estas nun rekonataj du slavaj gentoj, reciproke parencaj, tamen memstaraj. La ekzisto de "Ĉeĥoslovakoj" en etnologia senco estas kontestata, kaj ĉe la aplikado de la *Zamenhofa* sistemo oni maksimume povus paroli pri "Ĉeĥujo-Slovakujo", kio tamen estas formo nepre neakceptebla el politika vidpunkto. Ni ankaŭ prave demandas, kiu estas "mastragento" en Belgujo, Britujo, Hindujo, Jugoslavujo, Svisujo...

Tial ni decidiĝis, krei la nomon de lando el nomo de loĝantoj - ajne ĉu en senco strikte etnologia laŭ la *Zamenhofa* intenco (Turk-, German-, Franc- ..), ajne ĉu en vasta senco politika (Aŭstr-, Belg-, Brit-, Ĉeĥoslovak-, Hind-, Jugoslav-, Svis-...), laŭ tute sama maniero, t.s. per la pseŭdosufikso -io. Tio havas grandan avantaĝon: anstataŭ du sistemoj por devenigado de la landnomoj ni havas sistemon nur unu (laŭ la enloĝantoj same kiel laŭ urbo, rivero, monto, lago, oceano...) kaj ni evitis embarason en diskutaj limkazoj, ĉu -ujo estas ankoraŭ defendebla aŭ dubinda (Britujo? Jugoslavujo? Moravujo?).

Tiun unikan sistemon ni ne inventis, sed ties rudimenton ni transprenis el la pensoj de la lingvoaŭtoro mem kaj rekonis la oportunecon de ĝia ĝeneraligo, kiel ĝi estas praktikata en nemalgranda parto de la Esperanta mondo (la SAT-publikaĵoj, NUNTEMPA BULGARIO, EL POPOLA ĈINIO, vjetnamaj publikaĵoj...). Estas eble, ke la ekzisto de nia poŝatlaso pluŝovos la limon inter la praktikado de la sufikso -ujo kaj de

la pseŭdosufikso -io favore al ĉi lasta, sed certe neniu fordonas sin al iluzio, ke la diskuto pri tiu temo estos baldaŭ finita. Jam pro tio ne, ke la formoj kun -ujo estos -en difinitaj limoj - ĉiam korektaj, eĉ se apud ili vivos kaj vaste estos aplikataj la io-formoj kiel alternativa varianto. Pri tio ni samopinias kun Bu. En nia poŝatlaso do legiĝas: Albanio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germanio, ... Ĉinio, Hindio, Izraelio (PIV), Japanio, Etiopio k.t.p.

La disopinio pri tiu afero regas ankaŭ inter niaj kunlaborintoj. A. ALBAULT (1970), kiu kolektis ampleksan komparan materialon diverslingvan pri la landnomoj, venas al neevitebla konstato pri la ekzisto de la internacia sufikso -io (tamen li ne akceptas la formojn Meksikio, Panamio..., kiuj laŭ lia konvinkigo ne havas subtenon de internacieco); D. ARMAND (1963) rekonas la io-formojn por nomi la ŝtatojn, sed la formon kun -ujo li netradicie postulas por nomo de la teritorio, en kiu loĝas la gento kaj kiu ofte kovras partojn de pluraj regnoj (ni tion nomus: la sfero de la gentlingvo); C. STØP-BOWITZ (1969.-1970.) pledas por la uzado de la Fundamenta sufikso -ujo. Komparu ankaŭ en PIV la oftan paralelon de -ujo kaj -io.

7.4. Kelkaj landnomoj individue

Ni diras Svisio, do ni uzas formon, kiun *Zamenhof* rekonis kiel pli logikan kaj atendis, ke Akademio siatempe enkondukos ĝin. Tiu nomo ne estas devenigita de Svisoj, sed de la urbo *Schwyz*. La posta nomo de la enloĝanta popolo, kompreneble nur en senco politika, ne etnologia, estas sekundara.

La finaĵon -lando ni lasis pro superreganta tradicio ĉe Danlando, Irlando, Pollando, Finnlando, kvankam la formoj kun -io estus tute laŭsistemaj. Ĉe Tajlando kaj (jam historia) Malajlando gvidis nin motivoj de eŭfonio.

Laŭ Bu la nomoj Irlando kaj Tajlando estas primitivradikaj, ĉar laŭ lia opinio ne ekzistas gentoj Iroj kaj Tajoj. Ni rekonas tiujn gentnomojn. Pri Tajoj vidu ankaŭ en PIV.

Kiom koncernas Irlandon, la formo Ejro (M, PIV) ne estas internacia (same kiel Dojĉlando anstataŭ Germanio) krome gravas malkonsento de la Iroj mem, kiuj prave rimarkigas, ke per la duopo Ejro - Nordirlando, resp. Ulstro (M) oni fiksas artefaritan baron inter du teritorioj, loĝataj de la sama etna popolo (U, Su).

Ni ne adoptis la gentnomon Kimroj kaj ties teritorion Kimrio, anstataŭ la internacia Wales, do en Esperanta asimilo Valeso.

7.5. Landnomoj oficialaj kaj mallongigitaj

Ni jam supre menciis kelkajn neoficialajn mallongigojn por ŝtatnomoj. Ni diru tuj, ke la afero estas multe pli ofta, ol unuavide ŝajnas. Nur malmultaj nomoj de ŝtatoj en la

poŝatlaso estas laŭvorta traduko de plurvorta nomo oficiala, ekz.: Federacia Respubliko Germanio kaj Germana Demokratia Respubliko, Korea Popoldemokratia Respubliko kaj Korea Respubliko, Vjetnama Popoldemokratia Respubliko kaj Vjetnama Respubliko, Dominika Respubliko, Malagaŝa Respubliko. Sed Ĉeĥoslovakio, Britio, Pollando, Usono... estas mallongigitaj nomoj neoficialaj, tamen tradiciaj kaj oportunaj. Cetere, la leganto povas kompari mem: en la tekstoj de la poŝatlaso, la oficiala nomo de la ŝtato estas ĉiam citita en ties propra lingvo. Por oportuneco ni proponis apud la plentitola Sudafrika Respubliko mallongigon Sudafrikio kaj apud Vatikana Regno (PIV) Vatikano. La Lingva praktiko verŝajne uzados pliajn tiaspecajn mallongigojn: Okcidenta kaj Orienta Germanio, Nordkoreo kaj Sudkoreo, Nordvjetnamio kaj Sudvjetnamio...

Iu povus demandi, kial do Usono, kaj ne Nordamerikio? Ni respondas: Se ne ekzistus la nomo Usono kun sia longa tradicio, ni ne hezitus proponi tiun formon.

Jam ĝeneraliĝis simpligo de la ŝtatnomo *Great Britain* per nura Britio (kaj ne Grandbritio), ĉar ne ekzistas Malgrandbritio. Pro sama kialo la ŝtato *République de Haute-Volta* ricevis la simplan nomon Voltio (kaj ne Supra Voltio), ĉar ne ekzistas Malsupra Voltio.

8. REFERENCIOJ

- A ALBAULT, A. (1968): Nia geografia terminaro, SCIENCA REVUO, vol. 19, n-roj 3-4, p.105-112. Beogrado.
- A ALBAULT, A. (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). Tuluzo.
- Ar ARMAND, D. (1962): Transskribo de geografiaj nomoj kaj ĝia uzo por ordigo de nacilingvoj transskriboj. "Tema-ro por diskutado" de Unua Internacia Konferenco pri Lingva Problemo en la Scienco. Kopenhago.
- Ar ARMAND, D. (1963): Transskribo de geografiaj nomoj en Esperanto kaj ĝia uzo por ordigo de nacilingvaj transskriboj. SCIENCA REVUO, vol. 13, n-roj 1-4, p.84-90. Beogrado.
- Ar ARMAND, D. (1969): Transskribo kaj prononco de propraj nomoj. NUNTEMPA BULGARIO. Sofio.
- Ar ARMAND, D. (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM (Manuskripta materialo). Moskvo.
- Boi BOIRAC, E. (1909): Plena vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca. 180 p. Parizo.
- B BOKAREV, E. (1966): Rusa-esperanta vortaro. 536 p. Soveta Enciklopedio. Moskvo.
- Br BRACKE, A. (1968): Hodiaŭa Afriko. SENNACIULO, aprila n-ro. Parizo.
- Bu BUTLER, M. (1947-1949): Pri landnomoj 2-a eld. 8 p. BRITISH ESPERANTIST. Londono.
- Chi CHIUSI, I. (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). Frankfurto ĉe Majno.

- EPCĈ *EL POPOLA ĈINIO*. Monata gazeto eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo. Pekino.
- F *FISHER, C.* (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). *Meadville*.
- HSL *HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO*. Unua kajero. 1970. Vilno.
- I *ISAAC, N.* (1967): Vojaĝimpresoj de egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto. 64 p. *Dar Wahdan Pres.* Kairo.
- I *ISAAC, N.* (1969-1970): Lektoramendoj al la provizora traduko de PM. (Munskripta materialo). Aleksandrio.
- K *KALOCSAY, K.* (1970): *La Tempesto*. Tradukita verko de *W. Shakespeare*. Stafeto. *La Laguna*.
- LA *LÉGER, R.* - *ALBAULT, A.* (1961): *Dictionnaire Français-Espéranto*. 672 p. *Apendice LVII. Marmande*.
- Li *LIENHARDT, A.* (1969): Pri esperantigo de nomoj. (Manuskripta materialo). *Mulhouse*.
- Li *LIENHARDT, A.* (1970): Kie meti limon al esperantigo de nomoj?. *ESPERANTO*, oficiala organo de UEA. p. 116-117. Roterdamo.
- Mi *MISĈENKO, V.* (1968): sen titolo. *IOE-Gazeto*, n-roj 23-24, p. 12. Beogrado.
- M *MONDMAPO* (1968): Laŭ la decidoj de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Red. *T. Sekelj*. Eld. Internacia Instituto por oficialigo de Esperanto. *Geokarta*. Beogrado.
- Mo *MOCH, G.* (1910): Pri la transskribo de propraj nomoj. Esperantista dokumentaro. Parizo.
- Mul *MULDERS, E.* (1971): *Aruba*: miniatura Babelo en Kariba maro. *Esperanto*, Oficiala organo de UEA. p. 46. Roterdamo.
- Mu *MUNNIKSMA, F.* (1970): Nomlistoj de IEKI (Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio). *Eindhoven*.
- Ne *NEERGARD, P.* (1957): La vivo de la plantoj. 128 p. Stafeto. *La Laguna*.
- Ni *NIKOLOV, N.* (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). Sofio.
- NB *NUNTEMPA BULGARIO*. Sofio.
- NV *NUNTEMPA VJETNAMIO* (1965). 180 p. Fremdlingva Eldonejo. Hanojo.
- Oo *OOMOTO*. Monata Organo de Oomoto kaj U.H.A. *Kameoka Kio-to-hu*.
- P *PRIVAT, E.* (1967): *Vivo de Gandhi*. 160 p. Stafeto. *La Laguna*.
- PG *PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO* (1938). *K. Kalocsay - G. Waringhien*. Dua eld., 490 p. *LITERATURA MONDO*. Budapeŝto.
- PG *PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO* (1958, 1964). *K. Kalocsay - G. Waringhien*. Tria eld., 362 p. Esperanto-Propaganda Centro. Milano.
- PIV *PLENA ILUSTRITA VORTARO* (1970). Ĉefred. *G. Waringhien*. 1300 p. SAT. Parizo.
- PM *POŜATLASO DE LA MONDO* (1971). 80 mapoj fizikaj kaj politikaj, eĉ dekkoloraj. Informoj politikaj, administraj. Internaciaj organizoj, nomoj kaj flagoj. Eldonis, ellaboris kaj presis *Kartografie, n.p., Praha*.

- Ra RASBACH, J. (1970): La geografiaj nomoj de la Mondmapo. Esperanto-Gazeto (IOE), n-roj 36-37, p.5. Beogrado.
- Sa SADLER, V. (1970): Plena Ilustrita vortaro jam aperis! ESPERANTO, oficiala organo de UEA. p.139,142. Roterdamo.
- S SAVILLE, G. (1936): Rigardu la Teron. Verko de H.v. Loon. 454 p. LITERATURA MONDO. Budapeŝto.
- Sek SEKELJ, T. (1959): Tempesto super Akonkagvo. 232 p. Serbia Esperanto-Ligo. Beogrado.
- Sek SEKELJ, T. (1959): Nepalo malfermas la pordon. Kun leksikografia komentario de J. Régulo Pérez. 214 p. La Laguna.
- Se SETÄLA, V. (1968): Afriko kaj la lingva problemo. ESPERANTA FINNLANDO n-ro 5. *Iirislahti*
- S-B STØP-BOWITZ, C. (1969-1970): Amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). Oslo.
- Su SUTTON, G. (1971): Irlanda = Ejra? ESPERANTO, oficiala organo de UEA. p.13. Roterdamo.
- T THOMSON, A. (1960): Memuaro pri geografiaj nomoj. 8 p. *The Esperanto-Printers Ltd.* Londono.
- U UIGINN, L. (1970): Lektor-amendoj al la provizora traduko de PM. (Manuskripta materialo). Otavo.
- W WARINGHIEN, G. (1957): *Grand dictionnaire Espéranto-français*-368 p. *Librairie Centrale Espérantiste.* Parizo.
- W WARINGHIEN, G. (1959): Lingvo kaj vivo. 450 p. Stafeto. *La Laguna.*
- We WELLS, J. (1969): *Esperanto and English Dictionary.* 420 p. *The English Universities Presse LTD.* Londono.
- Z ZAMENHOF, L. (1962): Lingvaj respondoj. Red. G. Waringhien. 6-a eld. 134 p. Esperantaj Francaj Eldonoj. *Marmande.*
- Z ZAMENHOF, L. (1963): Fundamento de Esperanto. Naŭa eld., 356 p. Esperantaj Francaj Eldonoj. *Marmande.*

(Krom la ĉi tie referencita literaturo, PM profitis multajn aliajn Esperanto-verkojn, por kies mencio mankas la spaco.)